
# ESPERANTO

sub la suda kruco

septembro 2019





# ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

**OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ**
Volumo 26[3] numero 136 septembro 2019

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio
**Redaktistoj**: Terry Manley, Joanne Johns
**Provlegantoj**: Vera Payne, Donald Rogers
**Kontaktadreso:** esk2@esperanto.org.au

AEA - ESK
GPO Box 2122
Melbourne, Victoria 3001
Australia

**Abonoj & Pasintaj Numeroj**

Esperanto sub la Suda Kruco estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEA).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:
AEA: www.esperanto.org.au / info@esperanto.org.au
NZEA: www.esperanto.org.au / info@esperanto.org.nz

**Kiel kontribui al ESK**

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, esk2@esperanto.org.au

**Limdato por kontribuoj por la sekva numero**

15-an de novembro 2019

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj en ĉi eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne necese spegulas la opiniojn aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright @ 2019 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj
ISSN 1038-9380.

**SUR LA KOVRILO:** Pi

# ENHAVO


| | |
|---|---|
| Ni desegnu! | 04 |
| Kvar elstaraj Aŭstraliaj Esperantistinoj | 09 |
| Banĉambrolibraj artikoloj pri Eo | 11 |
| Ekskurso al Cleland Naturparko | 12 |
| Bjalistoko, la naskiĝloko de Z. | 16 |
| Kiel bibliotekoj adaptiĝas | 19 |
| La traktato pri Antarktio | 22 |
| Kiel mi memoris 180 ciferojn de Pi | 24 |
| La Universala Kongreso en Lahtio | 28 |
| Nova vortludo por Esperantistoj | 30 |

# Ni desegnu!

## JONATHAN COOPER (GOSFORD)

*(Bazita sur prelegeto prezentita ĉe la Aŭstralia Kongreso de Esperanto, Adelajdo, Januaro 2019)*



Bildo 1: Desegnado sur nebula fenestro

Desegnado estas tre natura ago. Tuj kiam ni rimarkas, ke ni povas lasi spuron – en sablo aŭ sur nebula fenestro – ni desegnas. Ne multe gravas al ni, ke la rezulto estas nedaŭra. Fakte, ĝi eble estas maldaŭrega. Desegnado esence estas spuro de movado.

Tamen se desegni estas tiom nature, tiom baze, kial plej multaj plenkreskuloj ne faras tion? Kompreneble, ni atendas, ke ĉiuj infanoj faru tion. Do, kio okazas?

Jen la etapoj de evoluo en desegnado por ĉiuj: Unue, kiel tre junaj infanoj, ni faris hazardajn strekojn. Grade ni lernis kiel regi tiujn strekojn. Poste, kun kuraĝigo de plenkreskuloj, ni komencis atribui signifojn al tiuj markoj: bukloj kun enaj makuloj fariĝis vizaĝoj, kaj linioj radiantaj de tiuj "vizaĝoj" fariĝis brakoj kaj kruroj (vidu Bildon 2). Baldaŭ poste ni komencis fari simplajn rakontojn per niaj bildoj, iom post iom pli kompleksajn. Proksimume 11- aŭ 12-jaraĝe, ni rimarkis fotojn kaj aliajn vivsimilajn bildojn, kaj provis realecigi *niajn* desegnaĵojn. Tio, kio poste okazis dependis de kiom da kuraĝigo ni ricevis de la plenkreskuloj ĉirkaŭ ni kaj, iom, de nia natura talento. Ĉi tio ofte nomiĝas la "krizo de realismo". Ni aŭ forlasis desegnadon, dirante al ni, ke ni ne posedas tiun lertecon, aŭ ni "trarompis" la krizon, kaj plibonigis niajn kapablojn plu.



Bildo 2: (Imita) desegnaĵo de tre juna infano

Tamen mi kredas, ke desegni gravas por ĉiuj (kaj infanoj kaj plenkreskuloj).

**Por vidi kiel artisto, oni devas lerni vidi sendepende de tio, kion oni scias.**

La libro Drawing on the Right Side of the Brain (Desegni per la dekstra flanko de la cerbo), de Betty Edwards, deklaras la principon de la du duonsferoj de la homa cerbo. La du flankoj rilatas al **du modaloj de pensado**: La "maldekstra modalo" estas logika, sinsekva, racia, objektiva kaj analiza (vidante aĵojn kiel sumojn da partoj). La "dekstra modalo" estas intuicia, nesinsekva, neracia, subjektiva kaj tuteca (vidanta aĵojn kiel neapartigeblajn tutojn).

Kvankam sciencistoj nun dubas, ĉu la rilato inter la duonsferoj kaj la du modaloj de pensado estas tiel klara, la ĝenerala principo ankoraŭ validas. Do, ni nomu ilin la **vorta** kaj **nevorta** modaloj.


Jen simpla pruvo. Nomu la ses kolorojn en Bildo 3.

flava blua oranĝa

nigra purpura verda

*Bildo 3*

Ĉu vi rimarkis iom da konflikto en via menso? Se jes, tio signifas, ke via nevorta modalo penis determini la kolorojn sed via vorta modalo insistis legi la vortojn.





*Bildo 4: Kiel la vorta modalo vidas homon*

En Bildo 4 vi povas vidi kiel la vorta modalo vidas la homan korpon, aŭ pli precize, la supron de ĝi: kiel kolekto da nomeblaj partoj.

Iam Betty Edwards petis kvar junajn mezlernejanojn desegni viron (per memoro). Poste ŝi petis lernantojn 1 kaj 2 kopii la desegnaĵon en Bildo 5(A). Kaj ŝi petis lernantojn 3 kaj 4 kopii la saman desegnon *la fundon supren*, kiel en Bildo 5(B).

Vidu la rezultojn en Bildo 6.




*Bildo 5: Pablo Picasso,* Portrait of Igor Stravinsky *ĉ. 1920.*
*A: normala direkto; B: inversa direkto*



*Bildo 6: Po du desegnaĵoj de ĉiu lernanto. La maldekstra kolumno montras desegnaĵojn per memoro. La dekstra kolumno montras kopiojn de la desegnaĵo de Picasso.*

Lernantoj 1 kaj 2 evidente luktis kontraŭ krucitaj gamboj kaj la ŝajna mallongiĝo de perspektivo. La desegnaĵoj de lernantoj 3 kaj 4 estis multe pli ĝustaj.


Kiel oni eksplikas tion? Nu, imagu, ke vi ekdesegnas seĝon. Citi Betty Edwards, 'La maldekstra duonsfero [la vorta modalo] ne havas paciencon pri tiu detala percepto kaj diras, efektive: "Tio estas seĝo, mi diras al vi. Tio sufiĉas por scii. Fakte, ne ĝenu rigardi ĝin, ĉar mi havas pretan simbolon por vi – jen; aldonu kelkajn detalojn, se vi volas, sed ne ĝenu min pri tiu afero de rigardado."[1]

Lernantoj 3 kaj 4 kopiis la desegnaĵon de Picasso sen facile scii kio estas kio. Do, ili povis (parte) malŝalti la vortan modalon.

Ekzistas diversaj ekzercoj por kuraĝigi vidadon kaj desegnadon nevortajn: taskoj, kiujn la vorta modalo ne bone faras aŭ pri kiu ĝi ne interesas. Ekzemple, desegni ion sen rigardi la paperon, aŭ desegni nur la spacojn *inter* aĵoj, ne la aĵojn mem.

Fine, mi montru al vi kelkajn desegnaĵojn, kiujn mi faris dum la pasintaj kelkaj jaroj. Mi ne montras ilin ĉar mi havas ian specialan talenton, sed ĉar mi, kiel la kreinto, havas specialan komprenon pri la celo kaj tekniko de ĉiu ekzemplo.

Bildo 7 estas aro de kvar rapidegaj desegnaĵoj, ĉiu farita dum 30 sekundoj. Mi devis esti tre selektema: mi elektis nur la ĉefajn



*Bildo 7:* Kvar duonminutaj pozoj



*Bildo 8:* Tony sidanta



*Bildo 9:* Carl kiel arkisto

gestojn. Ekzemple, en la malsupra desegnaĵo, mi rimarkis, ke la pozisto faras formon de cirklo.

Rimarku, en Bildo 8, kiel oni ne devas desegni ĉiun randon. La menso de la spektanto kompletigos la figuron.

Kiam unu linio iras “malantaŭ” alian (ekzemple en Bildo 9), ĝi kreas la iluzion de tri dimensioj.

En Bildo 10, mi ombrumis per linioj, kiuj ŝajnas sekvi la tri-dimensiajn formojn de la korpo. Mi penis montri kiel la korpo tunelas tra spaco.

Kelkfoje (ekzemple en Bildo 11) mi

*Bildo 10:* Rita kuŝanta



lokas min, por ke la lumo venu de *antaŭ* la pozisto. Tio kreas tian rezulton: la randoj ĉe unu flanko iĝas pli fortaj, kaj aliaj reflektitaj lumoj ankaŭ videblas.

Fine, kelkaj vortoj pri komponado. Ofte, oni desegnas sen atento al la randoj de la papero. La ĉefa celo estas, ke oni havu sufiĉan spacon por la tuta figuro. Tamen, estas bone pensi pri kiel la korpo kaj aliaj objektoj rilatas al la rektangulo. Se tempo permesas, oni povas krei kompletan komponaĵon, por ke la situo de ĉiu formo aspektas ĝusta kaj plaĉa. (Fakte, kelkfoje mi kreas rektangulon *interne* de la papero *post* kiam mi desegnis la poziston.) Ekzemple, en Bildo 13 rigardu kiel la linio de la supro de la kruro montras al la fino de la plankoplinto, kaj la dekstro de la tuko montras al la pordfosto. Kiom da aliaj vi povas trovi?



*Bildo 12:* Rita sidanta

[1]Betty Edwards, *Drawing on the Right Side of the Brain*, HarperCollins New York, 1983, paĝo 77 (traduko)



*Bildo 13:* Rita sidanta, *kun sagoj*



*Bildo 11:* Denese sidanta

# Kvar elstaraj Aŭstraliaj Esperantistinoj

**CHARLES STEVENSON (ADELAJDO)**

Tro ofte estis la viroj, kiuj tiom aktivis por Esperanto, ke oni memoras la edzinojn nur kiel helpantinojn de la edzo. Sed ĉiam en Aŭstralio Esperanto havis elstarajn virinojn. Ĉi-sube ni memoras nur kvar el la multaj, pri kiuj oni povus skribi.




**D-ro Lilian ALEXANDER**, kiu mortis en 1934, 73-jara. Dum multaj jaroj ŝi aktivis en la melburna esperanto-klubo.

Ŝi estis inter la unuaj virinoj, kiuj diplomiĝis en la Melburna Universitato kiel kuracistino. En epoko, kiam la ĝenerala vidpunkto estis, ke virinoj maltaŭgas kiel kuracistinoj, ŝia enskribiĝo en la universitaton akceptiĝis nur post ega oponado. La persistemo de Lilian helpis akceptiĝon de virinoj al medicinaj studoj en la posta tempo. Lilian estis unu el la fondintoj de la Queen-Victoria-Hospitalo, 'malsanulejo por virinoj funkciigata de kuracistinoj'. Tio ege necesis en epoko, kiam viraj kuracistoj ofte konsideris malsanojn de virinoj bagatelaj.



**S-ino May HARRISON.** "Alte respektata samideano" diris pri ŝi la Melburna E-Klubo kiam ŝi mortis en 1912. «Nepre dediĉita" al Esperanto (de 1908). Dum la unua Aŭstralia Kongreso de Esperanto en Adelajdo (1911), ŝi prelegis 'Tra la Oriento kun la komunikilo de Esperanto'. Forte kunlaboris kun Tilly Aston kaj ambaŭ iĝis elstaraj esperantistinoj. Fakte, May Harrison estis signifoplena homo en la vivo de Tilly Aston (pri tio legu en La Suda Kruco de decembro 1914), ĉar kiam ŝi aŭdis ke Tilly retiriĝis de sia universitata studado pro la manko de brajlaj lernolibroj, May ekkomencis tradukadon en brajlon, kiu daŭris dum dek ok jaroj, ĝis ŝia morto. May Harrison iĝis entuziasma sekretariino de la Viktoria Asocio de Brajlaj Skribantoj. Post ŝia morto la brajla biblioteko estis nomita en ŝia honoro kaj ŝia influo daŭris longe post ŝia morto. "Neniam mi renkontis virinon, kiu tuj pli allogis min, ol s-ino May Harrison. Ŝia animo vivis en la okuloj - kuraĝa, verama, aminda homo," skribis ĵurnalistino de The Advocate (1913.03.29). Neniam ŝi estis tre sana homo, sed ŝia morto estis bato kaj al la E-movado kaj al la Viktoria Blindula Societo. La ŝildo je ŝia memoro diras "ŝi estis la okuloj de la blinduloj.»





**S-ino Anna HINTZE.** Esperantistiĝis en 1923, kiam kuŝante en hospitalo ŝi ricevis de sia frato lernolibron de Esperanto. Ŝi entuziasmis pri la idealo kaj restis fidela al Esperanto ĝis la fino de sia vivo en 1963 (80-jara).

Fakte, ŝi starigis la tre aktivan Esperanto-grupon en Coburg, Melburno (1931) kaj estis la gvidantino kaj instruistino de la grupo ĝis 1941. Membro de AEA-komitato (1941). Dum multaj jaroj ŝi faris la permanan ekspedadon de La Suda Kruco.

“Fidela plenumanto de ĉiu tasko konforma al ŝia kapablo,” oni skribis en The Australian Esperantist: “senlaca aplikanto al alilanda korespondado, kaj konstanta praktikanto de Esperanto kiel lingvo de la ĉiutaga realo. Ŝia feliĉa personeco prilumis ĉiun klubkunvenon. Oni ne trovas ŝian nomon sur paĝoj de prestiĝaj gazetoj … Ŝia nomo daŭre restas, gravurita sur la koroj de mil amikoj.” Ŝi estis tre radikala politike. Esperanto estis preskaŭ ŝia religio. Kripla, ŝi devis porti feran splinton ĉe unu kruro kaj uzi lambastonon, tamen ŝi estis tre vigla. Dum someroj ŝi instruis naĝadon.



**S-ino Ada (Hallie) HOGG.** (Naskita en Melburno, mortis 1937.06.16 en Rose Bay, Sidnejo.)

Hallie Hogg, forta personeco, entuziasmis pri Esperanto en Adelajdo de 1909. Ŝi instruis Esperanton ĉe la Stenografia kaj Komerca Akademio de Adelajdo, kies estro estis ŝia edzo, William Hogg (kiu mortis ses monatojn post la unua Aŭstralia Esperanto-Kongreso). Survoje al la UK en 1914 ŝi troviĝis en granda tumulto, ĉar deklariĝis la Unua Mondmilito. Ŝi estis unu el miloj, kiuj strebis atingi Londonon. Ŝi laboris en brita milita malsanulejo ĝis 1915, kiam ŝi iris al Francio por daŭrigi tie sian laboron ĉe Ruĝa Kruco.

Ŝi verkis por ĵurnaloj. Ŝi skribis: “Mi honoriĝis kiel la unua virina pasaĝero en luksa Handley-Page-aviadilo. Ni komencis bone, kun ses pasaĝeroj en brakseĝoj – mi, la unusola aŭstralianino. Dufoje ni surteriĝis pro neceso. Ni neniam atingis Londonon, nur Amiens, de kie ni daŭrigis la vojaĝon trajne kaj ŝipe al la celstacio, Londono.”

Ĉiam forta propagandanto de Esperanto, ŝi fine loĝis en Sidnejo, kie ŝi parolis de tempo al tempo al diversaj grupoj. En la finaj dudekaj jaroj ŝi vojaĝis vaste kaj vivis en sesdek kvin malsamaj landoj.”

# Banĉambrolibraj artikoloj pri Esperanto

**MARK HAMME (USONO)**

Elkorajn Salutojn el la mezo de la Sonora Dezerto, t.e., usona malliberejo en Tusono, Arizono! Preskaŭ ĉiu malliberulo ĉi tie scias ke mi estas Esperantisto. Mia nuna institucia laboro estas bibliotekisto, kaj multaj viroj komentas pri la tri-parta artikolo pri Esperanto en la dudek-tria eldono de *Uncle John's Heavy Duty Bathroom Reader*. Okaze ke vi ne konas la "Banĉambrajn Librojn", tiuj estas libroj plenaj de bagatelaj faktoj pri preskaŭ ĉiu fako de homa scio.

Interese, la artikoloj nomiĝas "La Historio de Esperanto, Parto 1 (skribita tiel, paĝo 195), Esperanto, Parto 2 (paĝo 296), kaj Esperanto, Parto 3 (paĝo 373). Fine, la libro enhavas paĝon de Esperantaj esprimoj nomitaj "Let's Speak Esperanto."

"La historio de Esperanto" estas fakoj (laŭ ili) de "Elizaar Lei Samenhof" (skribita tiel). Tiu kvarpaĝa historio, kvankam enhavanta kelkajn aliajn erarojn (kiel "dopatrino" anstataŭ bopatrino) parolas bone pri la internacia lingvo kaj eĉ rekomendas ke novaj lernantoj skribu poemojn kaj leterojn Esperante por lerni la lingvon pli rapide.

"Parto 2" parolas precipe pri la obstakloj, kiuj malhelpis la akcepton kaj kreskon de Esperanto, inkluzive la lingvistojn kiuj kritikis Zamenhof-on ĉar li ne estis lingvisto, kaj tiuj, kiuj kredis ke lingvoj ne devas esti facilaj. Aliuloj malakceptas la internan ideon aŭ la homfratecon de Esperanto.

Tamen "Parto 3" defendas Esperanton, "la plej sukcesa konstruita lingvo", kies kulturo vivas ankoraŭ pro cent miloj da parolantoj de la lingvo kreita antaŭ pli ol cent jaroj.

Bone, mi ne raportas ĉion, kio aperas en la artikolojn. Mi rekomendas ke vi legu tiujn! (Vidu **www.bathroomreader.com**)

Alia afero; mi ricevas ESK-ojn kaj la Usona-n Esperantista-n ankoraŭ ĉe la malliberejo, sed korespondantoj devas sendi leterojn al mia patro, kiu gardos la kovertojn kaj poŝtmarkojn, kiujn oni sendas (ĉar mi estas filatelisto) ĝis mi translokiĝos al alia institucio, kie mi ja rajtos havi tiujn. Nuntempe ĉi tiu malliberejo forprenas ĉion kiu enhavas gluaĵon. Ni ricevas nur kopiojn de poŝtkartojn! Ĉio tio ĉar iuj kaŝas sintezajn drogojn en tiuj.

Sed mia patro sendas la leterojn rapide al mi. Skribu ĉe:

Mark Hamme

C/- Franklin Hamme

1831 Happy Hollow Road

Petersburg, WV 26847

USA

# Ekskurso al Cleland Naturparko kaj al Mt Lofty

## KAM LEE (HOBARTO)



Adelajdo, videbla de Mt Lofty



Bradley kun naturoficisto ĉe la Cleland Naturparka informejo



Arbo kaj multaj multkoloraj papagoj.

Januaron, 2019 grupo da Esperantistoj iris per du malgrandaj aŭtobusoj al Cleland Naturparko, kiu lokiĝas 22km sudoriente de Adelajdo.

La naturparko havas areon de 11,25 km$^2$ kaj estas dividita al regionoj, kiuj enhavas specifajn bestojn. Multaj de la regionoj estas ĉirkaŭitaj de barieroj kaj havas specialajn pordojn.

La naturparko estas nomita rilate al Sir John Burton Cleland (1878-1971), kiu antaŭe havis karieron en medicino kaj patologio kaj poste fariĝis bonkonata naturisto, mikrobiologo, mikologo kaj ornitologo.

Ni eniris la naturparkon, kaj poste la grupo disvagis al diversaj partoj de la naturparko. De tempo al tempo mi renkontis la aliajn Esperantistojn, ĉe lokoj kie la nutrado fare de la parkoficistoj al bestoj okazis.

Unue, mi vizitis la birdan rezervejon



kaj multaj papagoj estis videblaj. Rimarkebla estas speciala arbo, kiu estas sidloko por multaj birdoj. Ofte dek papagoj aŭ pli sidis samtempe sur ĉi tiu arbo kaj la kialo por ĉi tiu stranga fenomeno estas ankoraŭ mistero. Kelkaj grandegaj merloj ankaŭ ĉeestis.

Mi iris al la kangurua parko, kiu enhavas multajn Okcidentajn Grizajn Kanguruojn. La vorto "kanguruo" estis derivitaj el la Guugu Yimithirr vorto "gangurru". La vorto estis unue registrita "kangaru" je 12a de Julio 1770 en la taglibro de Sir Joseph Banks dum li estis en loko, kiu nun estas nomita "Cooktown".

Kanguruoj povas komforte salti po 20-25km hore, sed ili povas veturi




po 70km hore je mallongaj distancoj. Rapideco po 40km hore dum distanco de 2km povas esti atingitaj. Mi rimarkis, ke tiaj kanguruoj en ĉi tiu naturparko plej parte kuŝis sur la tero, malgraŭ ke estas sufiĉa senarba herbhavanta tero por salti. Mi opinias, ke la manko de kangurua agado okazis ĉar la temperaturo estis tro alta kaj nutraĵo estis donita de turistoj. Grandega kanguruo malrapide saltis al mi, haltis kaj poste malrapide forsaltis. Mi sukcese fotis ĝin!

Mi piediris en la emuan parkon, kiu estis seka herbkampo kiu enhavas multajn malgrandajn arbojn. Emuo estas la dua plej granda birdo laŭ alteco en la mondo. Tiaj birdoj povas havi altecon de 1,9 metrojn, sed la plej altaj viditaj emuoj havas eble 1,4 metrojn.

Emuoj povas kuri po 50km hore,







sed en la parko ili nur malrapide piediris eble ĉar rapida kurado nur taŭgas en senarbaj medioj.

Mi iris al la marĉejo, kiu enhavas multan akvon kaj la plantoj de la regiono estis tre verdaj. Plejparton de la tago, la marĉejo aspektas senbestaj, sed dum nutraĵtempo, la naturoficistoj venas kun nutraĵo kaj multaj birdoj aperas. Ili ĵetas fiŝojn por la pelikanoj, kiuj volonte akceptas la nutraĵon. Poste la cignoj kaj anasoj estis nutritaj.

La lasta vizitloko de la parko estis la lacertejo kaj kelkaj grandaj lacertoj videblis.

Je antaŭplanita tempo, multaj Esperantistoj rerenkontiĝis kaj ni piediris laŭ kruta 1,5km serpenta vojeto al Mt Lofty. Tre specialaj ŝuoj ne estas bezonataj, sed rimensandaloj ankaŭ ne taŭgas. Bonŝance, la temperaturo estis nur varmeta. Ofte dum la somero okazas varmegaj tagoj kaj do granda risko de arbarfajroj. La plej alta temperaturo registrita ĉe Mt Lofty dum Januaro ĉe la 685m super marnivelo estis 38,7 gradoj!

La ĉirkaŭaĵo apud la piedvojo estis ĉefe arbaro. Piedirante laŭ la vojo ni piediris super malgranda ponto, kiu lokiĝas super malgranda ravino.

Poste ni ripozis ĉe apuda ŝtona dometo, kiu nomiĝas Mt Lofty Ŝtona Dometo kaj estis konstruita en 1880. Ni feliĉe sidis kaj ripozis en la verando kaj ni tagmanĝis kaj ĝuis la belan kampan ĉirkaŭaĵon. La luebla konstruaĵo apartenas al YHA (Junulara Gasteja Asocio), kaj ĝi taŭgas por estonta Esperanta evento, ĉu ne?

Ni piediris aliajn 250 metrojn kaj finfine ni atingis la supron de Mt Lofty. Estis meze malfacila piediro, sed ni ĉiuj havis energion celebri kaj kio povas esti pli bona maniero celebri ol aĉeti glaciaĵon ĉe la butiko kaj fari grupfotojn?! Aŭtobusoj povas veturi al la pinto, sed mi ĝojis, ke mi grimpis ĉi tiun 710m altan monton, kiu estas la plej alta loko en la Suda Lofty Montaro.

La monto estis nomita Mt Lofty de Mathew Flinders je Marto 23a 1802, kaj Collet Barker estis la unua Eŭropano grimpi ĉi tiun monton. En 1885, 16,5m alta brika turo estis konstruita tie kiel trigonometria stacio. En 1902,





la konstruaĵo estis oficiale nomita Kolumno de Flinders. Ĝi estis uzata en 1938 kiel ilo por gvidi aviadilojn dum la nokto.

Oni povas vidi mezmalproksiman Adelajdon, kiu antaŭ Eŭropana ekloĝado estis loko loĝata de la indiĝena Kaurna homoj. En 1836, la loko estis proklamita Brita setla regiono. Adelajdo havas loĝantaron de 1.345.777 (2018) kaj ĝi havas la kvinan plej grandan loĝantaron en Aŭstralio. Adelajdo enhavas 77% de Sudaŭstralianoj, do ĉi tiu ĉefurbo estas la plej centralizita popolo de iu ŝtato en Aŭstralio.

La marbordo estis videbla, sed ĝi estis tre senklara pro brumo. La distanco inter Mt Lofty kaj la plej proksima marborda loko estas 19km okcidenten. Estis tre malfacile distingi inter la Golfo de Sankta Vincento kaj blua ĉielo.

La agrabla varma, senventa tago estis parte sennuba kaj plaĉis al ni sidi en la ombro. Surprizite, mi rimarkis homon rigardi la ekranon, kiu estis ligita al teleskopo. Ĉu li observis ion en la ĉielo? La homo diris, ke ĉi tiu speciala aparato estas uzata por rigardi la sunon! Periode, dum taŭga vetero ĉe la supro, li science rigardas ĉi tiun specialan stelon. Post plua klarigo, mi estis permesita rigardi la ekranon por vidi la sunon kaj serĉi eblajn sunmakulojn kaj sunajn lumraketojn. Kia neantaŭvidita scienca agado, ĉu ne?

Post la astronomia afero, ni piediris al proksima bushaltejo, kaj la du aŭtobusetoj revenis. Ni feliĉe revenis al Adelajdo kaj la civilizacio. Certe, estis memorinda ekskurso.



# Bjalistoko, la naskiĝloko de L.L.Zamenhof

**HEATHER HELDZINGEN (MELBURNO)**




Post la Universala Kongreso en Lahtio mi vojaĝis al Polando, viziti Esperantiston kiu vojaĝis al Melburno pasintan Majon. Ni vizitis Varsovion, Gdenjan, Sopoton, Gdanskon kaj Bjalistokon. Zamenhof naskiĝis la 5-an de Decembro 1859 ĉe la strato Zielona, kiu nun estas nomata strato Zamenhofa. Apud la loko kie iam staris la naskiĝdomo de Zamenhof estas tabulo kun foto de la domo kie la familio loĝis kun multaj aliaj.

En Bjalistoko, Esperantistino, Elzbieta Karczewska renkontis nin kaj piedirante ni vizitis multajn lokojn kiuj havis specifajn ligojn al la juna Ludoviko. Ni unue renkontiĝis ĉe la Esperanto Restoracio kie ni drinkis "Buze", kiu estis tipa studenta drinkaĵo kiam Zamenhof studis tie. "Buze" estas fermentita kaĉo kun tolerebla gusto.

Elzbieta estas la bibliotekistino ĉe la Zamenhof Biblioteko kaj muzeo. La muzeo nuntempe rakontas ĉefe pri la urbo en kiu Zamenhof naskiĝis kaj pasigis




sian infanecon. Materialo prezentata en la ekspozicio substrekas la multkulturecon de Bjalistoko, kiu inter aliaj aferoj iĝis inspiro al Ludoviko krei en posta periodo la Internacian Lingvon.

Li skribis:

*"Tiu ĉi loko de mia naskiĝo kaj de miaj infanaj jaroj donis la direkton al ĉiuj miaj estontaj celadoj. Oni edukadis min kiel idealisto; oni min instruis, ke ĉiuj homoj estas fratoj, kaj dume sur la strato kaj sur la korto, ĉio ĉe ĉiu paŝo igis min senti, ke homoj ne ekzistas: ekzistas sole Rusoj, Poloj, Germanoj, Hebreoj k.t.p. Tio ĉi ĉiam forte turmentadis mian infanan animon... Ĉar al mi tiam ŝajnis, ke la "grandaĝaj" posedas ian ĉiopovan forton, mi ripetadis al mi, ke kiam mi estos grandaĝa mi nepre forigos ĉi tiun malbonon"*





Nuntempe Bjalistoko estas bela urbo kun parkoj, placoj, kaj multaj memoraĵoj pri Zamenhof:

- Tabulo, kiu memorigas pri la naskiĝdomo de Zamenhof (la strato Zamenhofa 26)
- En la sama loko troviĝas granda trietaĝa murpentraĵo kun famaj bjalistokaj esperantistoj
- Monumento al Ludoviko Zamenhof sur la skvaro ĉe la strato Malmeda
- La memortabulo sur muro de iama gimnazio kie Zamenhof studis en la jaroj 1869-1873
- Bjalistoka Esperanto-Centro
- Porinfana Klinika Hospitalo je la nomo de Ludoviko Zamenhof
- Kvar stratoj: Zamenhofa, Esperantystów, Antoniego Grabowskiego kaj Jakobo Ŝapiro
- Historia muzeo kelkfoje preparadis ekspoziciojn pri Zamenhof kaj enhavas multajn memoraĵojn pri Bjalistoko de la Zamenhofa epoko
- Iama bazlernejo numero 23 je la nomo Ludoviko Zamenhof
- Ekde la 15a de Decembro nova bazlernejo havas la nomon Ludoviko Zamenhof



# Kiel bibliotekoj adaptiĝas al la moderna mondo

JOANNE JOHNS
(MELBURNO)

Se vi ne vizitis bibliotekon lastatempe, indas esplori kiel via loka biblioteko ŝanĝiĝis dum la pastintaj kelkaj jaroj. La populariĝo de bitlibroj kaj la facileco mendi malmultekostajn librojn en la interreto instigis bibliotekojn ĉirkaŭ la mondo pripensi kiel resti atentindaj kaj utilaj.

Unu el la plej bazaj ŝanĝoj estis oferti bitlibran katologon kune kun la "veraj" libroj. Per la membreco de mia loka biblioteko, mi povas pruntepreni bitlibrojn kaj aŭdiolibrojn de la sekvaj retejoj/aplikaĵoj - sen eliri el la domo!:

*Cloud Library*

*BorrowBox*

*RBdigital eAudiobooks*


*Freading*

Ĝi funkcias sufiĉe same kiel la kutima prunteprenado - ekzemple, en BorrowBox, se iu alia jam prunteprenis bitlibron, mi devas atendi. Mi nur rajtas havi la bitlibron dum 20 tagoj (sed mi povas peti pli da tempo se neniu alia rezervis ĝin), kaj mi nur rajtas pruntepreni 5 aŭdiolibrojn kaj 10 bitlibrojn samtempe (pli ol sufiĉe, mi pensus).

Mia membreco ankaŭ donas al mi senpagan alireblon al **lynda.com** - kie estas miloj da kursoj pri komerco, desegnado, programado, kaj al **ancestry.com** kie oni povas esplori sian familian historion.

Alia aldono al mia biblioteko, se mi ja volas eliri el la domo, estas la ebleco pruntepreni ne nur librojn, sed KD-ojn kaj DVD-ojn, videoludojn, ludilojn kaj tabulludojn.

Sed la plej interesa kaj drasta




*Bitlibroj en BorrowBox*

ŝanĝo al bibliotekoj estas la aldono de "farantospacoj". Ĉi tiuj spacoj enhavas la ilojn ebligi vizitantojn krei kaj lerni en komunuma etoso. La unua farantospaco en biblioteko estis en Novjorko en 2010. La ideo estis sukcesa, disvastiĝis, kaj nun multaj bibliotekoj ne nur estas lokoj por trovi librojn, sed por krei.

Jen kelkaj iloj kiujn oni povas trovi kaj uzi en pluraj modernaj bibliotekoj:

*3D presiloj*

*Aŭdioregistra studio*

*Kameraoj*

*Elektraj muzikiloj, kapaŭskultiloj kaj mikrofonoj*

*Komputiloj kun desegna kaj muzika programaroj*

*Videoludiloj*

*Lasertranĉiloj/gravuriloj*

*Viniltranĉiloj*

*Kudromaŝinoj kaj brodiloj*

*Skaniloj*

*Presiloj*

*Mikroskopoj*

*Elektraj lutiloj*

Ankaŭ ofte estas senpagaj kursoj pri kiel uzi la maŝinojn, kudri, programi, animacii, krei elektronikan muzikon kaj pli.

Laŭ mi, ĉi tio estas bonega maniero sperti kaj lerni novajn teknologiojn sen granda elspezo, kaj ankaŭ partopreni en via loka komunumo. Grave, ĝi donas al homoj la lertecon kaj memfidon krei kaj ripari en mondo kie aĉetado kaj forĵetado ŝajnas regi.



*Aŭdioregistra studio*



*3D presiloj*



*Lasertranĉilo*



*Ejo por krei elektronikan muzikon*

# KONTRIBUU

al




# ESPERANTO

sub la suda kruco

# La traktato pri Antarktio

**FRANCISKA TOUBALE (MELBURNO)**

Tiu traktato estis subskribata la 1an de decembro 1959, tio estas antaŭ 60 jaroj. Tamen ĝi tute aplikiĝis la 23an de junio 1961. Kio distingas tiun traktaton de la aliaj?

Tiu traktato estas dediĉita al paco kaj scienco, al interhelpo kaj kunlaboro. La 12 ŝtatoj, kiuj subskribis la dokumenton en 1959 - Argentino, Aŭstralio, Belgujo, Ĉilio, Francujo, Japanujo, Novzelando, Norvegujo, Sudafriko, Sovetunio, Britujo kaj Usono - establis 55 staciojn dum la geofizika jaro 1957-1958 cele kunlaboradon en scienca esplorado.

Antarktio estas vere nenies teritorio, sed ĉiu ŝtato respektas la suverenecon de la ŝtato al kiu estis atribuata parton de la teritorio.

La decidoj ne estas tiuj de la plejmulto, sed necesigas interkonsenton, do debatojn kaj provojn trovi la plej bonan solvon, en pacema etoso. La debatantoj devas esti ĝentilaj kaj ne devas insulti aŭ hontigi la aliajn partoprenantojn.


Iu ajn el la 54 ŝtatoj, kiuj agnoskas la traktaton, rajtas inspekti la aliajn staciojn kaj reciproke devas permesi inspektadon de siaj propraj stacioj.

Kvankam estas konate ke la grundo enhavas oron, karbon, uranion, kupron ktp... ne estas permesite mini ĝin .

Neniu rajtas okazigi militan aktivecon. Neniu rajtas forĵeti nuklean rubaĵon. Protektado de la medio estas unu el la celoj.

Dum la 60 jaroj la traktato funkciis laŭ sia statuto kaj donas al la homaro modelon de eblaj rilatoj inter la homoj. Kvankam timigas min malvarmeco, mi preskaŭ revas loĝi tie inter la pingvenoj kaj la fokoj. Sed ĉu tiu situacio daŭros? Ĉu eblus sekvi tiun modelon en aliaj internaciaj sferoj?





Year-round research station
Scale 1:68,000,000
Azimuthal Equal-Area Projection
South Atlantic Ocean
Port Elizabeth
SOUTH AFRICA
BRITISH CLAIM
Southern Ocean
NORWEGIAN CLAIM
ARGENTINE CLAIM
Scotia Sea
Orcadas (ARGENTINA)
SANAE IV
Novolazarevskaya (RUSSIA)
Maitri (INDIA)
Queen Maud Land
Syowa (JAPAN)
Molodezhnaya (RUSSIA)
French Southern and Antarctic Lands (FRANCE)
ARGENTINA
CHILE
Weddell Sea
Halley (U.K.)
Belgrano II (ARGENTINA)
Mawson (AUSTRALIA)
Amery Ice Shelf
Zhong Shan (CHINA)
Progress (RUSSIA)
Davis (AUSTRALIA)
CHILEAN CLAIM
Bellingshausen Sea
Amundsen-Scott (U.S.)
Indian Ocean
Peter I Island
Vostok (RUSSIA)
Mirnyy (RUSSIA)
Concordia (FRANCE AND ITALY)
South Pacific Ocean
Marie Byrd Land
Ross Ice Shelf
Wilkes Land
Casey (AUSTRALIA)
Amundsen Sea
McMurdo (U.S.)
Scott (N.Z.)
Ross Sea
AUSTRALIAN CLAIM
Victoria Land
Dumont d'Urville (FRANCE)
FRENCH CLAIM
Southern Ocean
NEW ZEALAND CLAIM
AUSTRALIAN CLAIM
South Pacific Ocean
NEW ZEALAND
Wellington
North Island
South Island
Christchurch
Tasmania
Hobart
Canberra
Sydney
AUSTRALIA
Esperanza (ARGENTINA)
Marambio (ARGENTINA)
Arturo Prat (CHILE)
Bernardo O'Higgins (CHILE)
Graham Land
Palmer (U.S.)
Vernadsky (UKRAINE)
Antarctic Peninsula
Larsen Ice Shelf
Southern Ocean
San Martín (ARGENTINA)
Rothera (U.K.)

# Kiel mi memoris 18O ciferojn de Pi


**JOANNE JOHNS (MELBURNO)**

En 2016 mi legis libron de Lynne Kelly, nomita *The Memory Code* (*La Memorkodo*). La libro temas pri kiel antaŭalfabetaj socioj memoris grandan kvanton da informo, kaj kiel ŝtonmonumentoj kiel Stonehenge verŝajne estas iloj por helpi memori tiun informon. Mi tre ŝatis la libron, kaj vi povas aŭdi iom pri ĝi en la 3ZZZ arĥivo ĉi tie: **https://melburno.org.au/3ZZZradio/2016/08/22/elsendo-de-la-22a-de-augusto-2016/**

Mia nura kritiko pri la libro estis ke mi volis havi pli klaran priskribon de le menciitaj teknikoj, por ke mi mem povu provi ilin! Feliĉe, ĉi jare D-ro Kelly eldonis novan libron por ĝuste tiu celo, kiu nomiĝas *Memory Craft* (*Memormetio*). Kompreneble mi tuj aĉetis ekzempleron!



*D-ro Lynne Kelly*




Ĉi tiu libro celas instrui la diversajn sistemojn por memori nomojn, datojn, faktojn, numerojn kaj eĉ librojn. Mi ankoraŭ ne provis ĉion, sed mi decidis ke estus interese eltrovi kiom da ciferoj de Pi mi povus memori, kaj kiom malfacile tio estus. (Sufiĉe simile al mia pensmaniero kiam mi ektrovis Esperanton, kaj prove decidis eklerni ĝin.)

Fakte surprizis min kiel facila la tasko estis - post iom da malfacila preparado kion mi ne devos ripeti. Por montri la utilecon de la sistemo, sen skribi ĝin, penu memori la numeron 854951485185. Ankaŭ, penu memori le jenan situacion: Homer Simpson sidas

sur via sofo, kaj li pentras punktojn sur etajn ŝuojn. Farbo kaj ŝuetoj estas ĉie kaj vi estas tre kolera. Vi iras al la kuirejo por trovi ion por helpi purigi vian kompatindan meblon, sed tie vi trovas Robin Hood, kiu preĝas en templo antaŭ statuo de granda benjeto kun rozkolora glazuro. Kiel stranga!





Sed sufiĉe de imagado! Jen, kiel mi komencis - sed memoru ke ĉi tio estas nur unu sistemo, kaj ekzistas aliaj pli simplaj por aliaj celoj:


**PAŜO 1 - Literigu la ciferojn 0-9**

La unua sekreto de la memorado de ciferoj, estas ke ni ne memoros ciferojn. Tio estus tro malfacila! Unu sistemo uzas ĉi tiun metodon por krei vortojn de ciferoj, sed ni faros pli ol tio.

Oni povas elekti iun literon por reprezenti ciferon, sed vi devas elekti saĝe. Vi vidos kial en paŝo 2. Ĉu la cifero 1 memorigas vin pri la litero T? Ĉu la litero I? Elektu laŭplaĉe. Jen la listo de la aŭtoro (maldekstre), kaj de mi (dekstre):

| | |
|---|---|
| 0 - O | 0 - O |
| 1 - J | 1 - T |
| 2 - R | 2 - N |
| 3 - B | 3 - E |
| 4 - A | 4 - R |
| 5 - S | 5 - S |
| 6 - G | 6 - G |
| 7 - T | 7 - D |
| 8 - L | 8 - H |
| 9 - D | 9 - L |

Komprenble la cifero 0 kiel la litero O estas komprenebla. Por la aliaj oni devas iĝi iom kreema. Mi elektis E por 3 ĉar la spegulaĵo de la cifero similas al la litero.



La vorto kvar finas per la litero R, la cifero 5 aspektas kiel la litero S, la letero N havas 2 krurojn, 7 estas dia numero, do D. Viaj elektoj estos simile strangaj al aliaj homoj, sed ili havos signifon por vi kaj tial estos pli facile memoreblaj.

**PAŜO 2 - Elektu homon, agon, objekton**

Mi ne mensogos - ĉi tio paŝo estas malfacila kaj bezonos pli da tempo ol vi pensus. Sed ĝi estas kritika paŝo kaj ebligas la memoradon de ses ciferoj samtempe, do indas la laboro.

La celo estas, por ĉiu numero inter 00 kaj 99, traduki ĝin uzante vian liston de literoj, kaj elektu homon (aŭ faman

aŭ konatan de vi) kies nomo komencas per tiuj literoj. Ekzemple, de mia listo (kiu bezonis kelkajn semajnojn por plenigi):

*48 - (RH) - Robin Hood*

*49 - (RL) - Roy Lichtenstein*

*51 - (ST) - Shirley Temple*

*85 - (HS) - Homer Simpson*

Poste vi havos cent homojn. La literoj, kiujn vi elektis en la unua paŝo eble kreos problemojn ĉi tie. Mi ne povis elpensi famulon aŭ konatulon por la literoj GE, do mi kreis fikcian armeestron "Generalo Elektra".

Nun, por ĉiu homo vi devas elpensi agon kaj objekton. Do, por la mia listo mi aldonis:

*Robin Hood, pafas sagon, verda ĉapelo kun plumo.*

*Roy Lichtenstein, pentras punktojn, flava farbo.*

*Shirley Temple, preĝas en templo, etaj ŝuoj.*

*Homer Simpson, strangolas Bart Simpson, benjeto kun rozkolora glazuro.*

Pluraj el miaj aliaj agoj kaj objektoj ne estas publikigeblaj - kaj por bona kialo. Ju pli maldeca kaj ŝoka la bildo, des pli bone vi memoros ĝin.

**PAŜO 3 - Konstruu palacon**

Ne, vi ne bezonos martelon. Ni fakte konstruos memorpalacon, kiu simple estas aro da bone konataj lokoj.

La antikvaj grekoj sciis ke oni pli facile memoras aferojn se ili estas ligitaj al loko. Ili do uzis ĉi tiun metodon. La celo estas imagi ke vi promenas laŭ bone konata vojo, ekzemple tra via domo. En ĉiu ĉambro vi elektu 5-10 lokojn en kiujn meti memorojn. Mia domo estas malgranda kaj mia celo (tute senutila, krom testi la sistemon) estis memori sufiĉe multajn ciferojn de



Memorpalaco ne estas ĉi tia palaco

Pi, do mi anstataŭe elektis mian dek minutan promenvojon de la stacidomo al mia laborejo. La unuaj kvin lokoj estas:

*La skanilo por mia transportkarto*

*La barilo apud la fervojo*

*La mezo de la ponto super la rivero*

*Brika muro kie oni metas afiŝojn*

*Bela arbo ĉe la stratangulo.*

Mi elektis kvin pli da lokoj ĉiun tagon ĝis mi atingis la oficejon, kaj fine havis 30 lokojn, kio ebligas min memori 180 ciferojn.

**PAŜO 4 - Imagu**

La unuaj ses ciferoj de Pi (post la komo) estas 141592. Uzante paŝon 1, tio egalas TR TS LN. Nun, ni bezonas la homon por TR, la agon de TS kaj la objekton de LN. Sen klarigo, en mia sistemo tio signifas ke Tony Robbins pafas bluan energion al neĝforiga maŝino. Mi metis tiun bildon ĉe la unua loko - la skanilo por mia transportkarto.

Ĉe la duo loko, Gwen Stefani manĝigas katojn per ĵokeroj. Kompatindaj katoj - sed jam 12 ciferoj! Kaj jen mi daŭrigas ĝis mia labortablo, kie Keanu Reeves[1] kuras sur ŝtuparo kaj portas kapaŭskultilojn, kio informas min ke la lastaj 6 ciferoj el la 180 estas 105559.

Mi certas ke se mia laborejo estus pli for de la staciodomo (aŭ se mi estus elektinta pli da lokoj inter la du) mi povus facile memori milojn da ciferoj tiel.

Ĉiun matenon dum mi promenas al la laborejo, mi mense interagas kun la karakteroj, fortigante la rakonton kaj tiel ankaŭ la 180 ciferojn de Pi. Mi ankaŭ povas imagi la promenon de mia sofo kaj ekzerci tiel. Ne necesas fari tion ĉiun tagon - la bildoj restos post tre malmulte da laboro kaj vi nur devas foje promeni en via palaco por fortigi ilin.

Mi uzis la saman sistemon (sed aliajn lokojn) por memori la telefonnumerojn de ĉiuj miaj kunlaborantoj. D-ro Kelly uzas kelkajn memorpalacojn kaj aliajn sistemojn por memori la historion de la mondo, la landojn de la mondo, la birdojn de Viktorio, lingvojn, la periodan tabelon kaj pli.

Sed ĉu vi memoris la numeron kiun mi donis al vi antaŭe? Verŝajne ne, sed eble vi ja memoras tiujn homojn, kiuj estas en viaj salono kaj kuirejo kaj kion ili faras. Kaj vi do povas vidi ke:

Homer Simpson (HS=85) pentras punktojn (la ago de Roy Lichtenstein - do RL=49), sur etajn ŝuojn (la objekto de Shirley Temple - do ST=51) kaj Robin Hood (RH=48) preĝas en templo (la ago de Shirley Temple - do ST=51) antaŭ benjeto (la objekto de Homer Simpson - do HS=85)

Kaj tio donas al vi la originalan numeron - 854951485185.

*Memory Craft* enhavas multajn aliajn sistemojn de ĉirkaŭ la mondo por pli bone memori, kaj klarigas pri ilia historio. Mi alte rekomendas ĝin.

[1]Eble vi scivolemas kiel mi elektis Keanu Reeves kiam mia sistemo ne enhavas la literon K? Bona demando... fakte li reprezentas la numeron 10, aŭ TO. Keanu rolis kiel Neo en la filmo *The Matrix*, kaj Neo estis konata kiel *The One*. Do mi imagas Keanu, specife vestita kiel Neo, sed li ĉiam nomiĝas *The One*. Penu elekti cent homojn por via listo kaj mi garantias ke vi ankaŭ havos tiajn strangaĵojn!




# La Universala Kongreso en Lahtio

**HEATHER HELDZINGEN (MELBURNO)**

Finnlando situas en norda Eŭropo kaj limas kun Svedujo nordokcidente, Norvegujo norde, Rusujo oriente kaj Balta Maro sude kaj okcidente. Finnlando deklaris sin sendependa la 6-an de Decembro 1917, post la Oktobra Revolucio en Rusujo, kaj ricevis sendependecon per dekreto de la bolŝevika registaro. Ĝi havas parlamentan sistemon, kie la prezidanto ne havas grandan politikan forton. La periodo de prezidanto estas ses jaroj.

Lahtio, konata pro vintraj sporteventoj kaj pro sia internacie renoma simfonia orkestro, estas la hejmurbo de 120.000 loĝantoj. Ĝi situas 100 km norde de Helsinko. En somero la temperaturo en la sudo de Finnlando varias inter 15 kaj 25 gradoj. La oficialaj lingvoj estas la finna kaj la sveda. Konforme al la temo de la Universala Kongreso, en la urbo vivas naturo kaj floras kulturo. Ĉi somermeze Lahtio estis elektita esti la Eŭropa Verda Ĉefurbo dum la jaro 2021.

La Lahtianoj aprezas sian urbon kiel sportan centron kun ĉiaj abundaj servoj. La kongreso lokiĝis en la Isku Areena kio estas glacihokea halo apud skisaltejo.

Dum la kongreso multaj ekskursoj haveblis inkluzive viziton al boacbieno, kie ankaŭ oni bredas sledhundojn kaj lupojn. Aliaj estis Saŭna vespero, Subĉiela dancovespero, kaj vizito al recikligejo. La Finnoj fieras ke ili recikligas 96 procentojn da sia rubaĵo.

Proksimume 900 partoprenis en la UK en Lahtio.

Ekde la solena malfermo ĝis



*Tipa finna domo*

la solena fermo, la partoprenantoj ĝuis interesajn paroladojn, teatraĵojn, koncertojn kaj kunsidojn. Dum la KAOEM kunsido mi raportis pri la agado en Aŭstralio kaj ricevis multe da intereso pri nia ventonta kongreso kune kun Novzelando.

Antaŭkongresa ekskurso al Helsinko kaj postkongresaj ekskursoj al Okcidenta Finnlando kaj Norda Finnlando haveblis. Mi partoprenis en la kvintaga ekskurso al Helsinko, kie ni vizitis la Sibelius-monumenton, la Helsinki-Katedralon, ŝipe krozis al Espoo kaj Suomenlinna, la fortikaĵo kiu protektis la landon, konstruita fine de la 18a jarcento.



*Sibelius-Monumento*



*Boaco*

Poste estis vizito per vaporŝipo al la mezepoka urbeto Porvoo, kie ni havis la ŝancon viziti ĉokoladfabrikon kaj ankaŭ gustumi la frandaĵojn!

Partoprenantoj el Usono, Brazilo, Aŭstralio, Japanujo, Francujo, Germanujo, Svedujo, Italujo ĝuis la gvidadon de Sakari Kauppinen, kiu organizis bonegan programon, interesajn informojn kaj neforgeseblan travivaĵon.



*Luterana Katedralo en Helsinko*

# Nova vortludo por Esperantistoj

**JOANNE JOHNS**
**(MELBURNO)**




En junio mi iĝis betatestanto de nova esperanto aplikaĵo - ludo kiu nomiĝas *Vortludo*. Mi provludis ĝin kaj avertis pri kelkaj cimoj, kiujn la kreintoj rapide riparis. La ludo poste lanĉiĝis al la publiko kaj nun estas senpage havebla por iOS kaj Android.

La ludo estis kreita da sendependa videoludstudio en Danio, nomata *Krifle Gamestudio*. Kun la helpo de la Dana Esperantista Junulara Organizo (DEJO) kaj Esperantista programisto D-ro Jacob Nordfalk, ili kreis ampleksan vortliston kun pli ol 6 milionoj da vortoj en Esperanto.

La ludo estas simila al skrablo, sed kun kelkaj gravaj kaj interesaj diferencoj. La ludtabulo konsistas de 16x16 koloraj ĉeloj, kaj 4 el la ĉeloj surhavas stelan simbolon, almenaŭ unu el kiuj estu kovritaj je la komenco de la ludo.

En via literpecaro estas 7 literoj hazarde prenitaj el la literujo. Sub la literpeco estas montrita kiom da literoj restas en la literujo.

Ĉiuj literpecoj havas certan valoron uzatan por kalkuli poentojn. Ankaŭ estas 2 malplenaj literpecoj kun nula valoro, kiuj agas kiel ĵokero, kiu povas reprezenti je ajna litero.

Vi povas kombini literojn sur la tabulon tiel ke ili kreas validan vorton. Sed atentu! La tabulo konsistas el bluaj kaj verdaj ĉelkvaropoj – 2x2 ĉeloj. Ene de ĉiu lokaro estas 1 kaŝita bonefiko, kiu pligrandigas la suman valoron de la vorto. Verdaj bonefikoj donas duoblan vortvaloron, kaj bluaj bonefikoj donas trioblan litervaloron. 2 kromaj "Vortludo"- bonefikaj ĉeloj, kiuj je malkaŝiĝo valoras je 3-oble la tuta vortvaloro, estas hazarde kaŝitaj ie en la tabulo.

Tiuj bonefikoj donas iom da ŝanco al kutime lertbazita ludo.

Via kontraŭulo venos (aŭ hazarde, aŭ elektite se vi havas ilian uzantnomon kaj ili konsentas ludi) el la aliaj ludantoj ĉirkaŭ la mondo, kaj vi povas sendi al ili mesaĝojn per la aplikaĵo por pli personeca ludo.

Se vi ŝatus ludi kontraŭ mi, elŝuti la ludon, elektu "amikojn" kaj poste "trovi uzanton" kaj serĉu "navear".

# Australian Esperanto Association

Esperanto House
143 Lawson Street
Redfern NSW 2016
Australia

www.esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
+61 (07) 4696 9293

Sandor Horvath | **President**
Jonathan Cooper | **Vice-President**
Heather Heldzingen | **Treasurer**
Esther Parris | **Secretary**

**Committee Members:**
Terry Manley, Indrani Beharry-Lall

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



# New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
info@esperanto.org.nz
0800 350 781

Bradley McDonald | **President**
Ivan Pivac | **Vice-President**
David Ryan | **Secretary/Treasurer**
Dave Dewar | **Assistant Secretary**

**Committee Members:**
Erin McGifford, Chris Krageloh

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.

**KONGRESO DE ESPERANTO**
kaj somerkursaro

aea.esperanto.org.au/kongreso

**AŬKLANDO**

10a-19a januaro 2020

